1-a Jaro, N-o 37

APERAS S.A.T. SEMAJNE

11. Junio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz	Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

La elmigrado el Jugoslavio

Multaj transportoj iras Brazilion. — La granda mizero de la loĝantaro. — La perspektivoj de l' elmigrantoj. — Homkomercado. — Malzorgado kaj inerteco de la registaro. — La rolo de Transoceanio en la vivo de l' jugoslavia loĝantaro.

Ĉi-jare, je la fino de aprilo, per transatlantika vaporŝipego kelkaj centoj da vilaĝanfamilioj elmigris de Jugoslavio, el unu haveno sur Adriatika maro, al vastaj stepoj de Brazilio. Dua transporto estas en ĉi-tagoj enŝipigota. Ĉiuj aĝoj, de infanoj envolvitaj en vindaĵoj ĝis plenaĝuloj kaj gepatroj, estis direktitaj al nekonataj vojoj de la sorto, por serĉado de la feliĉo, kiel ili diras. Tiu feliĉo konsistos el regulaj porcioj da pano kaj maizaĵo, kion ili ĉiutage bezonas por nutraĵo de siaj brunaj korpoj, kion al ili ne povas doni la hejma tero — ilia patrujo. — Kelkaj burĝpatriotaj ĵurnaloj plendas ke iliaj samlandanoj fariĝos novaj helotoj, sklavaro (terdungitoj) en pli malbonaj kondiĉoj ol ili estis eĉ sur la hejma grundo. Tie en malproksimaj stepoj de sovaĝa kaj dezerta Brazilio, kie regas terura *"flava malario"*, kaj kie neniam estis povanta plantiĝi iu homa vivaĵo, ricevos ĉi-elmigrintoj "en komisio" unu pecon da tero kun iuspeca budo (ligna dometo). Sur vastaj stepoj ili devas starigi plantaĵojn de kafo, kies profiton ili devas doni al Brazilia registaro. Al ili restos nur pecetoj.

Por kiuj ĉi homoj kulturos sovaĝan Brazilion? Eble pro tio, ke elmigrintoj kune kun la infanaro estu formanĝitaj de ni terura flava malario, kaj je fino fordonu elkulturitan kamparon al Brazilia registaro?!...

Ni ĉeestis ilian enŝipiĝon. Neniam tiel kortuŝege ni rigardadis infanaron, — infanaron formigrintan — tiujn amindajn estaĵojn ĵus aperintajn por ensuĉi teran oksigenon, tiujn viktimojn pereigotajn en sovaĝa Brazilio. Tiu vidaĵo ekdoloriĝegis nin kaj nia fantazio aperigis antaŭ ni bildon de ŝafidoj irontaj al buĉejo . . . Sed ili estis homŝafidaro, kiun nekonscie akompanas ĝia propra patrino. . . .

Sur vaporŝipego — kiel brutaro — agentoj taksis per nombroj la elmigrintaron, kaj demandis unu la alian, kiuj numeroj mankas? 61 kaj 103, estis respondo. Kaj ni tiamaniere ĉeestis al socia krimego, neniam en historio praktikebla tiuspece kiel en "progresemaj jarcentoj" pro ora dio — kapitalo.

Ĉu por ĉi-elmigrantaro ekzistos dorlotema nacia patrujo? Ĉu ĝi amos la patrujon forpelinta ĝin sur malariajn marĉejojn? Enlitiĝonta en febra konvulsio, atendante sian morton, ĉu ĝi iom flustros kiel rezulto de ĝia vivo! . . . Ĉu ĝi konscios kiu kaŭzis al ĝi tiun staton? Tiam ĝi eble fariĝos — en lasta spiro — revoluciulo, sed vane — ĝia cerbo fariĝos senmova kranio — — — — — — — —
— — — — — — — — — — —

Jugoslavio, konata lando, ludanta gravan rolon en sektoro de Meza Eŭropo pro sia eksportpovo de vivbezonaĵoj kiel: greno, tritiko, maizo, viando, ligno ktp., tiamaniere forpelados sian plej malriĉan parton de la loĝantaro en certan pereejon! . . . Ĉi pluson de eksporto kapablas sole iuj ebenaj kaj fruktedonaj partoj de la lando. Precipe riveranguloj, kie enfluas en Danubon riveroj Ticsa, Drava kaj Sava, estas Jugoslava grenejo, nomata Jugoslava Mezopotamio. Tiuj anguloj troviĝos laŭ Greenwich (Griniĉ) inter geografiaj meridianoj 18—21 de norda larĝeco, kaj paraleloj 44,5—46 de norda longeco, okupantaj supraĵon de proksimume 30 miloj da km². Sed antipode (sude) staras aliaj ŝtonozaj partoj (provincoj) en sia mizero forlasitaj al propra sorto — al malsatado. La registaro inaŭguranta kaj praktikanta neniun ekonomian politikon kaj disvolviĝon, nome: industriigon kaj enlandan koloniigon en ebenaj kaj fruktedonaj partoj, kaŭzas ĉi-staton. Pro tio, en ĉi-ŝtonozaj provincoj pro manko da kulturita kamparo kaj fabrikaro, pro manko da fervojoj kaj komunikiloj, do pro manko da laboro, rezultiĝas grandskala mizero.

Kio do savas ĉi-loĝantaron en ŝtonozaj (sudaj) provincoj de rekta pereado? Oni povas tute prave kaj konscience diri kaj statistike pruvi ke antaŭmondmilita elmigrintaro el Norda Ameriko, Aŭstralio, Nov-Zelando, savas ĉi 80% da malriĉa popolo — alie loĝantaro de ĉi provincoj estus neniigita. Elmigrinta dolarvaluto fariĝis ja por ili iuspeca „subvencia helpo". Familioj ne havantaj elmigrintojn estas devigataj, en la espero plibonigi neelteneblan materialan staton sur hejma grundo, formigri amase al stepegoj de Brazilio.

Adriatikuloj.

ĴUS APERAS

LA JUNIA KAJERO DE "SENNACIECA REVUO" KUN ENHAVO INTERESEGA POR ĈIU KAMARADO!

El nia kongresurbo

La loĝej-politiko de la socialdemokrata komunumo Wien.

Speciale verkita por "Sennaciulo" de la ofickondukanta urbkonsilanto por loĝejafero kaj socialpolitiko Anton Weber, Wien.

Antaŭmilita loĝeja politiko. — Multekosteco de loĝejoj — Dummilita loĝeja manko. — Loĝeja deficito post la milito. — Pretendoj de la jun-geedzoj. — Ruiniĝantaj domoj. — Loĝejkonstrua imposto. — Nova konstruagado. — Malfacilaĵoj en la kontraŭbatalo de la loĝeja mizero.

En la dumilionula urbo Wien (Vieno) antaŭmilita nur privatuloj konstruigis domojn, dume la komunumo tion tute ne faris; flanklasante la kelkcentojn da loĝejoj, konstruitaj el la propra pensifondo de la urba tramo, oni povas publike konstati, ke, en ĉi tiu granda urbo, la konstruado de loĝejoj el publika kapitalo estis nekonata. Sub tiaj kondiĉoj la privata tereno-spekulacio abunde prosperis. La loĝkulturon ĝuis nur malgranda aro da poseduloj, ĉar ĝi estis demando de rimedoj. *Wien havis antaŭ la milito la plej multekostajn loĝejojn.* Grandega amaso de l' urbanoj ne havis tiom da mono, por loĝi laŭhome. En neniu alia urbo de la mondo ekzistis tiom da litsubluintoj, en neniu alia urbo, pretendanta pri internacia kulturo, la loĝad-nivelo estis tiel malalta kiel en Wien. El la 540 869 loĝejoj en 1919 (ĝis tiam daŭris la regado de la antaŭmilitaj komunum-regantoj reakciaj) ne malpli ol 72,4 proc. estis malgrandaj, el kiuj preskaŭ 12 proc. eĉ ne havis ĉambron! Sole 13,69 proc. de la Wienaj loĝejoj havis gaslumon, kaj elektran nur havis 6,85 proc. La fundorento alta, la t. n. bone-burĝa rentumo de l' konstrukapitalo, kaj precipe la altaj *depagoj* ŝtataj kaj urbaj *(atingintaj proks. 40 proc. de la lupago)* ĉio kune nur ebligis la konstruadon de malvastaj malgrandaj loĝejoj, kiujn la popolamaso nur pene povis pagi. Ne estis parolo pri eĉ modesta loĝ-komforto, estis konstruitaj la famaĉaj loĝkazernoj kun kuirejoj en la koridoroj kaj necesejoj, kiujn devis uzi tri aŭ ofte pli da familioj kaj kun unu sola akvoelfluejo en ĉiu etaĝo. Tiel aspektis la Wien'a loĝ-politiko antaŭ la milito.

En la kvar militjaroj la loĝkondiĉoj ankoraŭ plimalboniĝis. Venis grandamase la fugintoj de la diversaj limoj, ne okazis nov-konstruadoj, eĉ konservadoj ne estis farataj. Estis tial vere senkonsola stato de la loĝej-afero, kiam post la milito la socialdemokrata partio prenis la administradon de la komunumo Wien kaj sekve devis solvi la taskon, malpliigi la loĝej-mizeron. Ĉar antaŭ la milito en Wien ĉiujare estis konstruataj proks. 12000 novaj loĝejoj, kaj dum kvar jaroj tiu agado ĉesis, — sekve en 1919 estis tia manko da loĝejoj, ke, eĉ se tuj post la milito estus revenintaj normalaj cirkonstancoj, sole en multjara plej intensa laboro ĝi povus esti forigata.

Tiu loĝejdeficito ankaŭ pro tio estis sentata tiel ege, ĉar malgraŭ la grandegaj oferoj sangaj de la Wien'a loĝantaro la loĝejmerkato ne estis senŝarĝita. Wien per la milito perdis 300 000 homojn, sed ne liberiĝis proporcie loĝejoj, ĉar el la familioj mortis nur kelkaj anoj, ĉiuj loĝejoj restis en posedo antaŭa kaj sole la loĝ-denseco malpliiĝis. Krome la Wien'a loĝej-merkato devis plenumi novajn postulojn grandegajn. La germanlingvaj oficistoj, precipe fervojistoj, forpelitaj el Ĉeĥoslovakio kaj aliaj sucesoraj [1]) ŝtatoj de la antaŭa monarkio, venis kune kun siaj familioj Wien'on kaj volis ricevi loĝejojn. Kaj *plej multe* postulis tiajn la *jun-geedzoj*. Pri tio servu kelkaj oficaj notoj montrantaj la pliiĝon de la edziĝoj kiel postsekvo de l' milito. En 1913 en Wien okazis 17 971 edziĝoj, en milito ili tre malplioftiĝis (1917: sole 13 431), sed jam en 1918 estis 16 389 t. e. preskaŭ la antaŭmilita stato. Sed nun venas la rekord-nombroj:

1919	26 182	1920	31 164
1921	29 274	1922	26 588
1923	19 827		

ĉiam pli ol antaŭ la milito.

La loĝej-oficejo de la urbo Wien dis-dividas la loĝejbezonantojn *laŭ tri grupoj*. En la unua, la preferita, kies membroj la unuaj ricevas loĝejojn, estas sole la geedziĝintoj, tial ili pleje ŝarĝas la loĝej-merkaton. Krome multaj loĝejoj iom post iom "ekparolas", t. e. la muroj ekkrakas. Antaŭ la milito en tiu okazo la urbadministracio pri tio tute ne atentis. Nun ankaŭ tie la komunumo devas helpi kaj ĝi renovigas tiajn domojn, kiujn la domposedantoj, aŭ pro manko da mono aŭ pro certa tendenco, lasas perei, per rimedoj propraj kaj certigas la monon hipoteke. Sed, se la kostoj de la renovigo estus tiel altaj, ke ili ne rentumas, la komunumo devas havigi loĝejojn al la endanĝerigitaj luintoj. Ankaŭ da tiuj estas multaj, kiuj akcelas plibonigon de loĝad-cirkonstancoj. Antaŭ la milito multaj personoj ja emis loĝi pli komforte, sed la alteco de la lupago tion malhelpis. Sed nun, kiam la lupago ne plu gravas, ili petas la loĝejoficejon, havigi al si pli ampleksajn loĝejojn. Se vere multaj personoj loĝas poamase en malgrandaj ejoj, la oficejoj helpas al ili kaj per tio plialtigas la loĝadkulturon. Tiaj familioj ricevas pli grandajn loĝejojn kaj la forlasitajn ricevas seninfanaj geedzoj.

Sed kiel kreas la komunumo Wien la multajn milojn da novaj loĝejoj?

Tio fariĝas plejparte per aparta imposto, la loĝej-konstruimposto, efikanta tre progresive kaj bazita sur antaŭmilita lupago. Paginte en 1914 360 orkronojn (1 orkrono estas proks. 15 000 paperkronoj) pojaran lupagon, oni pagas konstru-imposton de 108 000 paperkronoj por 1 jaro en monataj partoj de 9000 pk. Eĉ paginto de 1000 orkr. por la jaro 1914 impostas 28 300 pk. por 1 monato, sed ĉe 5000 orkr. jam 350 000 pk. Por komercejoj pli grandaj la loĝejkonstruimposto malpliikostas kompare al pli grandaj loĝejoj. Ekz. por paclupago de 10 000 orkr. por 1914 sumas tiu monata imposto

ĉe loĝejoj	1 350 000	pk.
„ komercejoj	874 900	„

Precipe rimarkebla estas tiu diferenciĝo kompare al luksaj loĝejoj. Paginte por 1914 50 000 orkr. oni nun devas pagi al la socialdemokrata komunumo Wien

por loĝejo	18 975 000	pk.
„ komercejo	7 291 500	„

ĉiumonatan konstruimposton.

Por 1925 la enspezo el tiu imposto estas buĝetita je 326 miliardoj da paperkronoj, sed por konstruado de loĝejoj pli ol 911 miliardoj. La komunumo Wien ĉi jare novkonstruos proks. 10 000 loĝejojn. Nuntempe estas konstruataj 5745 loĝejoj kaj 1000 koloniaj domoj, enloĝotaj en somero 1925. Tiuj loĝejoj povas esti nomataj modelaj kaj eĉ atingis la admiron de en- kaj eksterlandaj fakuloj, kaj montras loĝadkulturon, kian altgradon neniam povus esti produktinta la privata konstruagada spekulacio. La luprezoj en ĉi tiuj komunum-loĝejoj estas simile al tiuj en la privataj domoj. En la grandaj domaroj estas kunkonstruataj centraj lavejoj, infangardejoj, ludejoj, banejoj kaj librejoj. Ĉar la konstruo de tia loĝejo meze kostas 120 000 000 paperkronojn, la enspezo de la loĝejimposto kompreneble ne sufiĉas, kaj la ruĝa komunumo abunde aldonas propran monon tiucele por praktike lukti la loĝejmizeron.

Veran helpon kontraŭ la pli lasta nur povas alporti la konstruado de novaj loĝejoj. Krome devas resti centra priadministrado de la loĝej-merkato almenaŭ tiel longe kiel la nunaj cirkonstancoj daŭras. Tiukaŭze ekzistas la leĝo, per kiu la komunumo povas postuli certajn loĝejojn ne sufiĉe eluzatajn de privatuloj. Tiun leĝon la reakciaj partioj sukcesis tiom malbonigi, ke dume en 1922 la urba loĝej-oficejo povis leĝe ekkapti ankoraŭ 9692 loĝejojn, tiu nombro de 1922 malpliiĝis en 1923 je 6053 kaj en 1924 ĝi estis nur 2624. Daŭrigo de ĉi menciita leĝo estas necesa, ĉar alie pli riĉaj homoj tute simple per mono povus havigi al si loĝejojn laŭplaĉe kaj per tio vera ĥaoso ekiĝus.

Ĉe la loĝej-oficejo de la urbo Wien nun estas notitaj 22 229 familioj, urĝe bezonantaj loĝejojn, inter ili 1280 en kriza stato. Sed enkalkulitaj estas ankaŭ 4178, havantaj loĝejojn, sed tro malgrandajn pro la multeco de familianoj. Se la oficejo sukcesas, enloĝigi ilin pli komforte, tiam povas esti donataj iliaj loĝejoj al familioj malpli grandaj el la vico de la notitaj.

La neniam ĉesanta kaj plej persistema lukto de la Wien'a socialdemokrata komunum-administrejo kontraŭ la terura heredaĵo de l' milito, kontraŭ la loĝej-mizero, en antaŭvidebla tempo estos sukcese finita.

[1]) posteulaj, noveformitaj (el la disfalinta monarkio) ŝtatoj. Red.

La socialdemokrata administro de Wien okaze de komunum-elektoj en 1923 solene promesis, ĉiujare konstrui 5000 loĝejojn kaj tiun agadon dum 5 jaroj daŭrigi tiel, ke en 1928 estos konstruitaj 25.000 loĝejoj. Ĝi laŭ tiu programo jam ĝis nun laboris.

Dekonstruo de la loĝej-protektado havus laŭ financa vidpunkto eksterordinare malbonajn konsekvencojn je nia tuta mastruma vivo, ĉar multaj miloj da homoj ne povus pagi la — ĝis 15000 oble — plialtigitajn luprezojn, kaj tio kaŭzus socian katastrofon, pri kiu eĉ homoj, socie instruitaj, ŝajne ne bone pripensis. Sed ankaŭ laŭ justeca vidpunkto miloj da homoj venus en mizeron de senhejmeco, stato, je kiu ne povas esti avertata sufiĉe imprese.

Por la ruĝa Wien'a urbmastrumo la vojo estas klare signita; ĝi tiun sekvos pluen, ĉar ĝi ne nur estas la sole ebla, sed ankaŭ la plej bona solvo de tiel malfacila problemo de lukto kontraŭ la loĝej-mizero. *Trad. Moko.*

Letero el Sofio

Unua raporto ricevita de ni el Bulgario depost la eksplodo en la katedralo.

Kulpsento kaj tim-ordono de la militministro. — Fimortigo de poeto. — Malapero de homoj. — La kunkulpeco de tuta Eŭropo. — Alvoko al la homeco!

Malgraŭ la terura reĝimo, en kiu ni vivas, eble ne ĉio estas tiom favora por la regantoj, ĉar hodiaŭ la militministro anoncigas *ordonon*, en kiu li deziras doni ian senkulpigon. Li atentigas siajn subulojn pri la neceso de la ekzakta plenumo de la leĝoj, ĉar inter la socio kuras famoj pri faroj kaj kontraŭleĝaj agoj de senrespondecaj faktoroj: grupoj kaj personoj. Sed ankoraŭ tiu ĉi ordono ne estas legita de ĉiuj, kiam famo trakuris la socion ĝin plene diskreditiganta, famo pri faro de senrespondecaj grupoj kaj personoj.

Antaŭ kelkaj tagoj la distrikta juĝejo en Sofia kondamnis la poeton *Geo Milef* je 1 jaro da malliberigo kaj 20000 lev. monpuno pro unu lia poemo "Septembro". Kaj malgraŭ la "rekono"[1]) de la leĝo", kiun ili mem kreis, Geo Milef estas mortigita. Tio estas sekreto ankoraŭ, oni kaŝas sian agon, sed mi sciiĝis pri tio okaze.

Geo Milef malaperis, kiel malaperis multaj jam sennombraj homoj en nia lando, sen leĝo, ne sciate. Estas mallumaj personoj tie ĉi, kiuj plenumas abomenindaĵojn, kaj neniu povas liberigi la bulgaran popolon de ili, ĉar ili estas registaro mem, kiu sin apogas al la armeo, al la oficiraro, al la bruta forto. Ĉu ankaŭ en la cetera mondo malaperis la homoj, kiuj iam pledis kaj aŭdigis voĉon kontraŭ la tiranio, kie ajn ĝi furiozas, por la plej elementaj rajtoj de la homo? Ŝajnas ke ankaŭ en la tuta cetera mondo oni preferas silenti, ĉar tiuj ĉi agoj de abomenindaj malhomaj estaĵoj konvenas al la potenchavantoj en Eŭropo kaj alie. La popolo, ekdezirinta memstarecon, devas esti subpremita kaj ĉio en tiu direkto sufokota. Kiam tio koncernas nian materialan bonon, ĉia homeco estas nekonsiderata.

Sed ĉu ne troviĝas personoj kiuj povus influi la publikan opinion en la okcident-eŭropaj landoj, kiu postulos ke ĉie oni estimu la elementajn homajn rajtojn? Ĉu la homaro ne estas unu tuto, kiu zorgas ke nenie, en neniu terangulo estu malhonorigata ĝia nomo de senkonsciaj fiuloj?

Tiucele mi turnas min al vi. Represu ĉi-liniojn, sendu ilin al gazetoj nacilingvaj en ĉiuj landoj, vaste diskonigu ilin. De tie ĉi oni nenion povas fari, ĉe nura suspekto oni lin kaptas kaj en la plej feliĉa okazo nur malliberigas kaj batas kruele, sed se li havas tian kulpon, laŭ kiu oni ne povus lin kondamni je morto, sed tamen li estas malagrabla, oni lin mortigas dumnokte, plej ofte "en okazo de fugo", kiam oni lin irigas ien aŭ oni lin "mempendigas". Tiele malaperis eksministroj kiel Kiril Pavlov kaj Peter Janev, deputitoj Kosovski, Petrini, ĵurnaleldonisto kaj redaktoro Josif Herbst kaj multaj aliaj, kies nomojn eĉ la aŭtoritatoj nun ne scias ankoraŭ.

Ankoraŭ kelkaj miloj da civitanoj, el kiuj multaj senkulpuloj kuŝas en malliberejoj.

Skribi pli? Kial? La okazantaĵoj estas nepriskribeblaj, oni devas ilin travivi, mem vidi kaj senti. Mi eĉ ne estas certa, ĉu la letero vin atingos, ĉar oni cenzuras. Pro tio mi ne subskribas la leteron.

1) prefere: agnosko. — Red.

La 1. majo en Riga

La malpermesita demonstracio. — Konfiskitaj gazetoj. — Arestitaj gvidantoj. — La kontraŭrevolucia unuecfronto. — „Unuiĝu, proletaro!"

Post kiam Riga'a komitato de soc.-dem. partio en la kunsido de 20. aprilo decidis ne festiri la 1. majo kune kun Riga'aj profunioj, — al centra oficejo de la lastaj restis nenio alia ol prepariĝi al demonstracio tute aparte malgraŭ la foresto de parolantoj kaj gvidantoj ĝuantaj deputitan netuŝeblecon, kiujn posedas socialdemokratoj. La 22. aprilo la centra oficejo de R. P. W. petis la lokan administracion permesi la 1-majan manifestiron al Esplenado (centrurba placo) kie ĝis nun la laboristoj konstante kunvenadis dum tiu tago. Ne ricevinte ian respondon la C. O. petis de la prefekto klarigojn, niu lasta ne hezitis sciigi ke Esplenado estos okupita de militistaro paradonta (la burĝoj samtage festas la datrevenon de l' inaŭgura konstitucia kunveno), tamen li, prefekto, konsentus, se C. O. mencius alian vojiran planon kaj placon. La 28. aprilo frumatene C. O. enmanigis novan planon, elektinte kiel kunvenloko la ĉirkaŭaĵojn apud la "frata tombejo". Malgraŭ tio la prefekto ne ekkuraĝis permesi manifestiron pro jenaj kaŭzoj: al li ne plaĉas la lozungoj de C. O. kaj li „ne posedas" sufiĉan nombron da policistoj. La manifestiro de Riga'aj profunioj amplekssantaj grandan nombron da laboristoj, ne okazis.

Okazis io alia. La 30. aprilo je la 4 h. posttagmeze tuj post ricevo de prefekta respondo menciita, la centran oficejon vizitis policisto, sciiganta ke laŭ telefonogramo de la prokuroro la unuamaja alvoko de C. O. kaj ĵurnalo "Stradneeku Veeniba" (Laborista Unuiĝo) n-o 15 ankaŭ enhavanta la alvokon, estas konfiskitaj. En la manaĉojn de l' policisto falis nur 30 numeroj, ĉar ĉiuj jam estis dissenditaj kaj disvenditaj. Plue, la saman tagon vespere estis arestitaj 10 plej konsciaj kamaradoj destinitaj por gvidado kaj parolado. Domtraserĉadoj nenion rezultigis. Interalie interese malsaĝaj kaj naivaj estis la demandoj proponitaj al arestitoj dum esploro en politikagentejo: "Kial vi estas notita parolonto, sed ne iu alia?" "Kion signifas la lozungo: Vivu laborista internacio?" "Kion signifas la okazintaĵo ke dum la balotoj al municipalo neĺegala komunista Partio subtenis 16. balotliston (la liston de profunioj)?" ktp.

Arestitojn oni liberigis nur la 1. majo je 11 h. nokte, tiele malebligante ilin ankaŭ partopreni okazintajn miting-koncertojn.

Pri solena "festo" de la 1. majo neniu povis pensi. — Mi komprenus tiun staton dum cara aŭ kaizera regado, kiam laboriston oni ne konsideris homo. La tronoj estas faligitaj, la libera demokratio starigita, sed ĉu ŝanĝiĝis io? Ĉu ĉio jam estas atingita? Ĉu la proletaro jam posedas iajn rajtojn? Pro kio "festi"? Ĉu pro akirita okhora labortago? Kie? Mi ne scias. Vi eble diros ke en multaj landoj ĝi estas leĝigita. Bonege, do pro kio en la samaj landoj inter aliaj programpostuloj oni nepre renkontas ankaŭ postulon pri la "8-hora labortago"? Sekve vi ĝin ne posedas. Jen granda nepardonebla krimego antaŭ la tutmonda proletaro de ti-kiuj per siaj predikoj kaj paroloj mallumigas kaj stultigas la cerbojn de malkonscia malfeliĉa popolamaso, treege suferanta, multe pli ol dum cara reĝimo. La demokratio? Mi nur povas konsili al vi, subtenu la kapitalistaron, kreskigu ilian havaĵon, plibonigu ilian bontrovon, fortigu ilajn vicojn kun ĉiuj iliaj ĝendarmoj, policistoj kaj diversaj faŝistaj bandoj, kaj vi ekvidos, ke post nelonga tempo la tuta mondo (kapitalista) stabiligita ekfloros, sed la proletaro? Ho ve, por la lasta restos nur malliberejoj "demokratiaj", aŭ morto. Ĉu vi tute ne rimarkas ke kun ĉiu kresko de la kapitalo paŝon post paŝo forglitas la rajtoj kvankam bagatelaj iam jam akiritaj de la laboristaro? Pri novaj akiraĵoj dum demokratia regmaniero pensi povas nur naivulo aŭ homo, al kiu la sufero kaj mizero de la popolamasoj kaj entute la proletaro estas flanka afero kaj kiu eluzas la malkonscian parton de la proletaro nur por propra bontrovo.

"Proletarioj de ĉiuj landoj unuiĝu" do ne por belaj interparoloj kaj reciprokaj komplimentoj? Ne, kamaradoj, nur por komuna agado, por faroj kaj posta kunvivo. Nun ĉiuj kapitalistaj landoj eĉ la "plej demokratiaj" sub mieno de sen-

armiĝo treege armas sin surtere, sur-submare kaj enaere. Ili konvulsie prepariĝas al nova abomena faraĵo — hombuĉado. Ĉiu ilia argrumentaĵo kaj certigo pri sen-armiĝo, pri pacemeco estas mensogo. Ĉiu ilia certigo pri solidareco kontraŭ ia komunisma influo kaj danĝero enlande estas trompo. Ili frontunuiĝas kontraŭ viaj fratoj — kamaradoj en oriento, ili celas post renverso de la sola proletaria ŝtato en Oriento, vin subtenanta, vin apoganta, deziranta nenion alian ol la plej baldaŭan liberiĝon de la tutmonda proletaro — ili celas direkti siajn fiagojn kontraŭ vin mem por sufoki, enkatenigi kaj pereigi vin por ĉiam. Kaj se vi ne ekagos, ne unuiĝos, vi pereos. Estas plej urĝa tempo. Returniĝu al vera teorio de Karl Marx kaj Engels, aŭ se vi ĝin malemas, atentu almenaŭ la vortojn de iama utopiisto t. n. Kristo, kiu eĉ diris: "Nek viaj preĝoj, nek kredo vin savos, sed nur viaj faroj" — "la kredo sen faroj estas morta". Komprenu do, kamaradoj kaj unuiĝu, solidariĝu kun viaj fratoj. Ni ĉiuj ja estas idoj de la sama familio, ni ĉiuj havas komunan malamikon, ni ĉiuj celas la samon — la liberigon de la proletaro — la socialismon. Do unuigu viajn disigitajn fortojn, ekiru al via liberiĝo kaj pli bona estonteco! Post venko vi "festos".

Neŭtralulo.

La nova leĝo pri la "kaŝaj asocioj" en Italio

Kiel oni voĉdonas leĝojn en Italio. — La plej gravaj paragrafoj el la nova kontraŭproletara leĝo. — Granda bruo ĉe la loĝantaro pro ĝia akcepto.

La itala deputitaro, per unuanima voĉdono de la 304 ĉeestantaj faŝistaj deputitoj, la 19an de majo aprobis la leĝon proponitan de la ĉefministro Mussolini pri la t. n. "kaŝaj asocioj". La kontraŭregistaraj deputitoj (entute 231) ne ĉeestis la voĉdonadon, ĉar granda parto el ili (la t. n. "Aventino") plu ne ĉeestas la parlamentajn kunsidojn depost la mortigo de dep. Matteotti (10. junio 1924), kaj la aliaj (t. e. komunistoj kaj liberaloj) estis decidintaj ne partopreni *tian* voĉdonadon. Dum antaŭa kunsido, la ĉefministro klarigis, ke nura celo de la leĝo estas kontraŭbatali la framasonaron; sed efektive, certe oni uzos ĝin ankaŭ (aŭ precipe?) kontraŭ la proletaraj partiaj kaj sindikataj organizaĵoj. Nun la leĝo estas voĉdonenda de la Senato, kaj subskribenda de la reĝo: post tio ĝi ekefikos. Jen estas iomete mallongigita tradukaĵo de tiu reakciega leĝo:

"Art. 1. — Ĉiuj kaj ĉiaj asocioj ekzistantaj en Italio kaj en ĝiaj kolonioj, estas devigataj sciigi la policistaron pri siaj regularo, anaro, estraro, celoj kaj agadoj, tuj kiam la policistaro demandos ilin pri tio pro kaŭzoj rilatantaj la publikajn ordon kaj sendanĝerecon.

Tiajn demandojn devas respondi la asociaj centraj kaj sekciaj estroj post ne pli ol du tagoj: malokaze, oni punos ilin per almenaŭ trimonata malliberigo en arestejo kaj per monpuno de dumil ĝis sesmil italaj liroj (unu liro egalas nun ĉirkaŭ 0,20 svisajn frankojn).

Se oni donas *sciante* neverajn aŭ neplenajn informojn, la malliberigo estos pli severa kaj daŭros ne malpli ol unu jaron, kaj la monpuno estos de kvinmil ĝis tridekmil liroj, kune kun kvinjara malpermeso pri la publikaj oficoj.

Se la sciigoj malestis, aŭ se ili estis neveraj aŭ neplenaj, la provincestro (itale: *prefekto*) rajtas eksigi la asocion.

Art. 2. — Krom la enhavo de art. 1, ĉiuj kaj ĉiaj oficistoj kaj laboristoj de la ŝtato, de la provincoj, de la komunumoj, kaj de ĉiaj institucioj laŭleĝe zorgataj de la ŝt., prov. kaj kom-umoj, kiuj (oficistoj ktp.) apartenu al asocioj eĉ nur parte kaŝaj aŭ kies anoj estu iel devigataj je la sekreto, estas eksigataj el siaj oficoj. Demandite de la ministro aŭ de la provincestroj, tiaj oficistoj ktp. estas devigataj diri ĉu ili estas *aŭ estis* (!!!) anoj de *iu ajn* nacia aŭ internacia (eksternacia) asocio.

Tiuj, kiuj ne respondis tian demandon post du tagoj, estas senoficigataj kaj sensalajrigataj dum ne malpli ol dekkvin tagoj kaj ne pli ol tri monatoj.

Tiuj, kiuj sciigis malvere aŭ neplene, estas sensalajrigataj dum ne malpli ol ses monatoj."

La teksto de art. 1a estas la originala de la ĉefministro: la nuna, akceptita teksto de la art. 2a estis proponata de la katolika deputito Martire, kaj estis aprobata de la ministroj. Kompreneble, la aprobo de tiu leĝo vekis grandan bruon en Italio, ne nur inter la gelaboristaro, sed precipe inter la demokrata kaj liberala malgrandburĝaro, el kiu konsistis en 1922 la ĉefa subtenantaro de la faŝismo!

Sennomulo

TRA LA KLASBATALO

En Bulgario estas ekzekutitaj la tri mortkondamnitoj, kiuj laŭ diro de la akuzo partoprenis la atencon en la katedralo de Sofio. Multaj aliaj k-doj en diversaj urboj de la lando estas mortkondamnitaj de la tribunaloj. La burĝa gazetaro de Eŭropo silentas.

En Algeciras, hispana havena urbo, okazas striko de havenlaboristoj, kiu celas kontraŭ la ekspedicio en Maroko. La militista aŭtoritato sendis teknikajn trupojn.

En la japanaj ŝpinejoj de Tsingtau la laboristoj strikas. La japana registaro sendis du kanonboatojn al Tsingtau! Laboristoj estis forpelitaj de la fabrikoj de ili okupitaj, per militistaro. Kelkaj mortintoj.

En la angla Mossul-teritorio eksplodis ribelo, dum kiu la anglaj trupoj havis gravajn perdojn. Kelkaj britaj aviadiloj estis terenpafitaj.

En la valo de Maroŝ (Rumanio) la lokaŭtitaj segejlaboristoj pro la teruraj persekutadoj post deksemajna sangoplena lokaŭto reekkomencis la laboron laŭ 10-hora labortago. (1762)

Iom pri nuna stato en Finnlando

La efikoj de l' alkohol-malpermesa leĝo. — Kaŝvendistoj de alkoholo. — Severaj punoj. — Nekonsciaj laboristoj. — La salajroj de l' laboristoj. — La prezoj de l' vivbezonaĵoj. — La lingva problemo.

Kiel eble kamaradoj scias, estas en Finnlando malpermesa leĝo por alkoholaĵoj. Do neniu povas vendi aŭ posedi alkoholdrinkaĵon. La leĝo estas iom severa. Ĉar se oni trovas alkoholaĵojn en aŭtomobilo, kvankam eĉ nur unu malgrandan boteleton, tuta veturilo estas konfiskata kaj ties posedanto arestata. Kaj la posedanto de veturilo, krom perdo de sia veturilo, povas ricevi longdaŭran areston. Ankaŭ tutaj ŝipoj estas konfiskitaj de ŝtato. Okazis, ke iu virino havis specialajn poŝojn en sia jupo por portado de kanistroj [1]. Oni kondamnis ŝin en arestejon, kaj la jupo estis konfiskita de ŝtato. Sed ĉu tiu ĉi severeco portas fruktojn? Preskaŭ tute ne. Ĉar en ĉiu vilaĝeto, eĉ ne parolante pri urboj, svarmas kaŝvendistoj kunportante sian komercaĵon en kvantoj iomete rimarkindaj. Kaj ties prezo varias je ĉirkaŭ 100 mk. [2]) po litro.

Iu eble demandus, kiel tio ĉi estas ebla? Nu, ĉar granda parto de la finna popolo estas favora al kaŝvendistoj, tio povas okazi. Ankaŭ okazis, ke mem policanoj vendis alkoholaĵojn. Ankaŭ inter laboristaro estas multaj uloj, kiuj ne scias la signifon de malpermesa leĝo kaj tiel premas la kolon de sia propra klaso, tute forgesante, ke estis laboristaj parlamentanoj, al kiuj apartenas la merito pri tiu leĝo, sep reprezentantoj de ilia propra klaso.

Ankaŭ kelkajn vortojn pri salajra stato: Nuntempe segej-laboristo (la segejoj estas plej multnombraj en lando) havas kiel mezan salajron (en kontrakto, po laboro) 5,0 mk. pohore kaj laboristinoj 3,0 mk. pohore. Laboristo, havanta nur pohoran salajron, ricevas 3,75—4,0 mk. pohore, virinoj 2,0—2,50 mk.

Prezoj de vivbezonaĵoj proksimumas la sekvantajn:

1 kg da seka pano	7,0 mk. finn.
1 litro da lakto	2,25 „ „
1 kg da bovoviando . . .	8,0 „ „
1 „ „ porkviando . . .	18,0 „ „
1 ovo . . .	1,25 „ „
1 kg da sukero	10,0 „ „
1 „ „ salo	1,0 „ „
1 „ „ butero	28,0 „ „
1 „ „ margarino	18,0 „ „
1 „ „ kafo	26,0—30,0 mk.
1 paro da ŝuoj	130,0—175,0 „
1 „ „ botoj 200—250, bonaj	300,0—400,0 „
1 vesto	500—1000 „

Luo por unu malgranda ĉambro 100—150 po monato.

Multaj segejoj donas ĉambron, lumon kaj hejtaĵon senpage. Senlaboreco estas granda, sed ĝi povas iom faciliĝi dumsomere pro nun okazanta eksporto de lignaj produktaĵoj.

Ankaŭ nun estas en tagordo lingva problemo, kvankam plej grandparte inter bur-

1) Apartaj ladaj ujoj.
2) 100 finn. markoj egalas 2½ dolarojn.

ĝaro. Finnlando nome havas du lingvojn, finnan kaj svedan. Sed finnoj havante plimultecon iom preferis sian lingvon kaj tiel kaŭzis la malkonsenton. Tiaj lingvaj fanatikuloj bezonus grandan porcion da sennaciismo. *Vojaĝemulo No. 695.*

DISKUTEJO

Sur la vojo al unueco

Celo de l'reformo

Ne ekzistas specialaj organizaĵoj por propagandi la aplik-necesecon de l'elektro, vaporo, aviado, kooperacio, sporto. Ties utileco estas nun de ĉiuj agnoskita. Neeviteble alvenos tempo, kiam la utilo de esperanto-apliko estos tiom konvinkiva, ke *ni plu ne bezonos specialan propagand-organizon.* La proletaro ja subtenos kaj aplikos Esperanton kiel ĝi nun subtenas kaj partoprenas kooperacion aŭ sporton. Kaj tia "mondlingva movado sen propagandaj specialaj asocioj" devas esti de hodiaŭ nia celo. *La malapero de disaj land-asocioj kaj fondo de propagand-sekcioj el SAT-anoj estas transira ŝtupo al tia organiza formo.* La poresp. laboro fariĝas la *akcesora parto* de l' peresperanta. Kiel ĉiu arbo havas sub tero radikojn, same SAT havos ĉiuloke porvarbajn sekciojn, kiuj nutros la asocion per freŝaj fortoj.

La reformo estas do tute natura etapo sur la evolu-vojo de nia juna movado.

La reformo estas des pli necesa, ke ĝi permesos pliintensigi la SAT-laboron.

Ja de nun ĉiu nov-varbita k-do devos tuj aniĝi al SAT (kiel membro — subt. aŭ asp.) — Do, tio ke ni ĉiun varbos al SAT mekanike elvokos tion, ke ni *devos* kaj nur *eblos* limigi nian agadsferon ekskluzive je la klasbatalemaj internacie pensantaj rondoj.

Ni havos vicon da avantaĝoj:

1) samtempa propagando pri *Esp.o* kaj *SAT;*

2) plilarĝigo de l'SAT-anaro, la kondiĉo necesa por ke SAT povu normale agadi kaj senĉese utili al proletaro;

3) unuanimeco kaj solidara laŭplana agado de ĉiuj revoluciaj esp.istoj kune.

Dank' al tio la por- kaj per-esp. laboro estos harmonie ligita kaj ne ekzistos plu abismoj inter niaj disversaj agad-regionoj.

Kiel ni faros la reformon?

La nova organiz-formo ne pekas kontraŭ la statuto de SAT. Ja al neniu estas malpermesite fondi interkonsente kian ajn fakon (kondiĉe ke ties celoj ne estu direktitaj kontraŭ SAT).

Do niaj propag. sekcioj estos tute vivrajtaj. Ili ja estos kolektivoj de SAT-anoj libervole organizintaj sin por *propagandi kaj instrui* sur la lingvoregiona skalo, por *varbado al SAT,* kie estas ebla la tuja praktika apliko de Esp.o.

Sed ĉu ni eblas ĉie rapide efektivigi la reformon?

— Kompreneble, ne.

Estas diversaj land-kategorioj:

I. En Hungario, Rumanio, Bulgario kaj similaj estas dubinde, ĉu ni povos tie ion fari, ĉar SAT estas tie persekutata.

II. En Britio, Ameriko, Italio, Portugalio, Finnlando kaj aliaj landoj, kie ne ekzistas naciaj propag. gazetoj (de labor. esp.istoj) kaj kie la land-asocioj ne estas tro fortaj, la fondo de propag. asocioj povas okazi treege facile. Sufiĉas ke SAT-anoj de l' resp. lando decidu pri la reformo, varbu al SAT tiujn esp. laboristojn, kiuj ne estis ĝis nun en niaj vicoj, kaj post kelkaj semajnoj la reformo estos farita.

Eble, ke la sekcioj (ili estas treege facile organizeblaj, ĉar la aniĝo estas mekanika, ne postulas specialan kotizon) aperos en multegaj regionoj, kie estis neniaj landasocioj de lab. esp.istoj.

III. En regionoj franc[1]*-, german-, ruslingvaj* kaj sim., kie ekzistas relative pli fortaj land-asocioj ol en aliaj lokoj, oni ne povos, eble, tro rapide efektivigi la reformon. Estos granda laboro farenda:

1) bone *klarigi* al ĉiuj ne-SAT-anaj klasbatalemaj labor. esp.istoj, kial ili nepre devas SAT-aniĝi, kaj iom post iom varbi ilin al nia asocio;

2) *klarigi* al multaj k-doj kial SAT'on ne povas anstataŭigi iu "Internacio" esp.-ista. Ja la mondlingvo faras tute malnecesa la konservon en niaj vicoj de la laŭnacia divido. Inter *samlingvanoj* ne povas esti *laŭnacia divido.* Se al kelkiuj ne plaĉas la sektor-sistemo, ili proponu kion ajn alian, sed ne naciistaĉan organizmanieron.

3) laŭ la bona "propono de l'redakt. de "Esper. Hejme" k-do Lidin (eldirita rilate al SEU, sed taŭga ankaŭ aliloke), *voĉdonigu* la SAT-anoj en ĉiuj grandaj land-asocioj, ke SAT-anoj rajtu mekanike senkotize[2] aliĝi al porvarbaj land-asocioj. Ja ili kotizas, aĉetas literaturon, abonas "S-ulon" kaj "S. R." Ili jam havas multajn elspezojn kaj oni ne povas ilin devigi nepre kotizi (t. e. samtempe aboni la nacian gazeton). Nur por la ne-SAT-anaj membroj de l'land-asocioj la plena kotizo (t. e. kun abonpago inkluzive) estu deviga. Se la asocioj bone altiros ĉiam novajn kaj novajn abonantojn, la gazetoj eblos plue normale aperi kaj disvastiĝi.

Do ni vidas ke en ĉefaj landoj, la reformo povas esti efektivigata ne subite, sed laŭgrade: komence SAT-anigi la tutan anaron de l'resp. land-asocio (aŭ ties klasbataleman parton) kaj post tio la fondo de propag. sekcio ne estos tro malfacila.

Nur SEU estas specifa organizaĵo. Ĝi ne estas ekskluzive porvarba, sed havas kroman taskon laŭ sia statuto: informi kaj propagandi por Sovetio. Sed tia laboro povas esti plenumata per komun. frakcio (kun la helpo de eksterpartiulaj Soveti-amikoj) aŭ per proponita de ni pasintjare ("S. R." — jul. 1924) *sovetiista* (ne sovetia nure) fako el ĉiulandaj volontuloj.

Ĉu SAT povas esti la kerno?

Preskaŭ ĉiuj k-doj konsentas ke ni bezonas unuigon de nia movado, sed ne ĉiuj konsideras SAT kiel taŭga por tiu celo.

K-do 2921 prave diris, ke la kaŭzo kuŝas en tio, ke multiuj vidas en SAT malperfektaĵojn. Tial la demando pri SAT-plibonigo, se ĝi estos bone solvita, eblas bone influi je la problemo pri reformo de nia propagand-organizo.

Ju pli SAT estos perfekta, des malpli restos da kialoj por rifuzi unuiĝi ĉirkaŭ ĝi.

Mi ne ripetos tion kion diris k-do 2921. Lia plano estas (krom 1—2 detalaĵoj) tute bona. Li rekomendas racian aranĝon por ke ne estu ĉe ni burokratismo (duonjara tempo por ĝenerala voĉdonado, ekzemple).

Sed pli ol ĉio akriĝis la *politika* demando en SAT. Estas tro frue, por ke ni eblu nin organizi laŭtendence. Do, necesas resti en la unikfronteca organizaĵo k. labori ĉiuj solidare k. fratece. Ne-revoluciajn laboristojn ni en SAT ne alprenos, sed ni devas ĉion fari por ke ĉiuj klasbatalemaj k-doj havu en SAT samajn rajtojn, ne havu kialojn plendi pri maljustaĵoj aŭ io simila, ke ili bone varbu ĉiuj inter siaj rondoj, laborante "ĉiuj por ĉiu, ĉiu por ĉiuj". Tiam SAT evoluos rapide k. senkatastrofe.

Por tio estas proponate:

I. Urĝe (ne pli malfrue, ol en junio) la Direkta Komitato kreu per la Ekzekutiva Komisiono *unuecfrontan redakt-komitaton,* kiu konsistu el la reprezantantoj de ĉiuj (3?) ĉefaj tendencoj politikaj en SAT kaj estu *respondeca de l' ideologia vidpunkto* pri la enhavo de "Sennaciulo" kaj verkoj de l' eldon-kooperativo. Ŝajnas oportune, ke la komisionon elektu la plej grava SAT-grupo (Leipzig) kaj ke ĉiujn membrojn ĝiajn aprobu la estraro de l' resp. tendenco (kom., s. d. frakcio, ISAB). La komisiono laboros 1-2 horojn po-semajne, decidante kune kun la redaktoro pri la presota materialo de l' kuranta N-ro de „S".— La redaktoro estos denun respondeca por la gazeto nur de l' teknika vidpunkto.

II. La Kongreso en Vieno nepre debatu la demandon pri la rajtoj de l' tendencaj fakoj: kion la fakoj rajtas fari, kion ne, ĉu la fakoj rajtas eldoni aŭ ne tendencajn foliojn k. cet. eldonaĵojn *per sia propra mono* (de l' fako). Ja la sukcesoj inter sampartianoj dependas de tio, kiel funkcios niaj fakoj.

La aranĝo de necesaj reguloj k. solvo de l' demando pri inter-tendencaj konfliktoj permesos al ni likvidi la malbonan atmosferon, ŝvebantan nun en SAT-anio. — Ĉiuj estu sinceraj k. laboremaj. Ĉiuj donu siajn proponojn k. helpu unu la alian por reekfunkciigi la asocion kiel decas.

---

1) Pri Francio legu en S.-ulo 34 (Kron.)

2) Aŭ pagante nur koston de l' membrokarto kaj por poŝt-elspezoj.

El la propono de k-do 2921 ne estas aprobindaj kelkaj detalaĵoj:

1) estas dume pli oportune ke la DK estu reelektata ne ĉiujare, sed 1 fojon por 2 jaroj. Ja en nia asocio estas malfacile fari sur tutmonda skalo ĉiujarajn rebalotadojn.

Estas neeble, ke ĉiu sektoro dume elektu siajn kandidatojn al DK. Alvenos tempo kiam la sektoroj bone funkcios (sektoran patriotismon oni ne timu; ĝi ne estos danĝera!), sed nuntempe, el la ĉefaj sektoroj (1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, 11, 30) nur 4—5 kapablas aranĝi memstarajn elektojn. Do ni dume konservu la ĝis nunan balot-manieron. Tamen estos pli demokratece, se la sektoro, kie troviĝas, ekzemple, pli ol 250 SAT-anoj, rajtos je pluaj 1 DK-ano kaj 1 ekstra DK-ano por ĉiuj 250 k-doj laŭ *ono* de 250, t. e. por 500—750: po 3, 750—1000 po 4 ktp.)-

2) ne estas racie ke materialo-interŝanĝon peru Centrejo de informservo. Se la informejoj senpere interŝanĝos materialojn, ili (la materialoj) estos pli freŝaj, pli interesaj.

Necesas noti ke la informservo povas esti fondita jam hodiaŭ. Ne gravas ke ĝi komence estos iom "miniatura". Ja niaj organoj: gazeto, kooperativo, ankaŭ estis komence malgrandsignifaj, sed poste iom plifortiĝis.

* * *

La unueco estas facile atingebla, se ĉiuj ĝin deziros kaj se ĉiuj ankaŭ deziros solidarecan kamaradan kunagadon de klaskonsciaj mondlingvanoj.

Ĝi eblas alporti multajn fruktojn se ĉiuj tuj reeklaboros kun nova energio, nova entuziasmo. Sed estas necese, ke ĉiuj k-doj estu plene amikecaj unuj rilate al aliaj, ke ili ĉiun proponon kaj ĉiun elpaŝon studu kaj funde pripensu. Kaj, estu certaj, ni havos tiam la bazon de pluaj sukcesoj.

La Viena kongreso havigos la okazon kunvenigi, eble, konferencon de ĉiuj SAT-anoj-propagandistoj kie oni debatu pri la reformproblemo.

Kamaradoj! En unuiĝo estas forto!
Agu, ne forgesante tion!
Vivu la unueco! *V. Kolĉinski.*

K-doj! Studu plej funde la problemon. Ne kontentiĝu je la simpla elmontro de via aproba aŭ malaproba rilato al la reform-afero. Proponu ĉion, kion vi konsideros utila. Dum la diskutado elŝoviĝos multaj aprobindaj proponoj. Ja jam aperis du interesaj proponoj:

la *unua* (de k-do Lidin kaj Kazan'a Gubern. Komitato de SEU) pri la duma mekanika (senkotiza) aniĝo de SAT-anoj al naciaj org-ĵoj (taŭgas dume, ĝis la reformo);

dua — pri tio, ke la kotizo por aspirantaj kaj subtenantaj individuoj estu altigita je 25—30 %, sed ke anstataŭ la jarlibro ili ricevu organon ĉiumonatan de resp. propagandsekcio; la subten. org-ĵoj ricevu jarlibron kaj propagand-gazeton. Ĉi aranĝo nuligus la timojn de multaj k-doj, kiuj atendas ke la unueca kotizo likvidigos la nac. propag. gazetojn. *V. K.*

VARBU POR VIA GAZETO!

SAT-konferenco de Rejnlando

okazis la 24. majo en *Leichlingen* je invito de la SAT-grupo Solingen. Malgraŭ la malbela vetero 80 gekamaradoj el Düsseldorf, Köln, Essen, Elberfeld, Barmen, Hilden, Leverkusen, Wiesdorf, Leichlingen kaj Solingen estis ĉeestantaj.

K-do *Wengenroth* - Solingen malfermis la kunvenon je 10 a horo. K-do *Remers*-Düsseldorf estis elektita kiel prezidanto, k-do *Cierpka*-Köln vicprezidanto, k-do *Palm*-Solingen kiel sekret-protokolanto. La tagordo enhavis 5 punktojn: 1) Viena kongreso, 2) Aliĝo de LEA-esperantistaro al SAT, 3) SAT kaj Esp.-karteloj, 4) Lingvaj demandoj, 5) Diversaĵoj. Je la **unua punkto** k-do *Gläser*-Solingen pledas por kompleta vortarego, pri kiu la Kongreso diskutu. K-do *Petersen*-Köln proponas, ke ĉiu SAT-membro estu devigata aboni Senn. Ĉi tiu propono kaŭzas longan diskuton. K-do *Cierpka* parolas kontraŭ la ŝanĝo de la statuto. K-do *Remers* kontraŭparolas, ĉar SAT ankoraŭ estas juna kaj ne matura movado. Fine jena propono estas akceptita de ĉeestantoj:

Rilate al la abondevo de aktiva membro ĝustige estas anstataŭenda en la Statuto la vorto "Senn. Revuo" per "Sennaciulo".

K-doj *Cierpka* kaj *Klopfleisch* plendas pri la fratbatalo diversfrakcie kaj pri la apartaj kunvenoj de frakcioj dum kongreso.

K-do *Petersen* konsentas, sed konstatas, ke la frakcioj estas fonditaj por enkonduki Esp. en la internaj rondoj. K-do *Klopfleisch* opinias, ke S-ulo enpresas tro malmulte da artikoloj de socialdemokratoj. K-do *Petersen* diras, ke redaktoro de S-ulo nur povas enpresi artikolojn, kiujn li ricevas. K-do *Remers* opinias, ke SAT-kongreso ne plu estas necesa, ke sufiĉus, se ĉiujare nur kunvenus la administrantoj, sektorestroj ktp. K-do *Petersen* proponas, ke la proponoj, kiujn malakceptas la kongreso, ankaŭ estu prezentotaj al la Sat-anaro. Post longa debato jena propono estas post transformo akceptita de la konferenco:

SAT-konferenco de Rejnlando en Leichlingen deziras, ke estonte partipolemikaĵoj inter la SAT-movado estu forigotaj. SAT montru proletarian unuecfronton. Partifrakcioj agu nur ekstere de SAT. Krom tio la kunveno konsilas al la redakcio de S-ulo, ke la materialo aperonta en S-ulo estu nepre objektiva; rilate al strikraportoj aŭ similaj oni nur menciu, se eble, la koncernan gvidantan organizaĵon de ĉi-striko.

Punkto 2-a. K-do *Petersen* parolas pri aliĝo de naciaj Esp-organizaĵoj al SAT. La konferenco post diskuto forsendas salutskribaĵon kun deziresprimo al la plenestrarkonferenco de LEA kiu okazos pentekoston en Leipzig.

Punkto 3-a. SAT- kaj Esp-karteloj.

K-do *Cierpka*: La SAT-anoj de Köln aliĝis al Esp-Kartelo, kiu konsistas el 4 laboristaj kaj 1 burĝa grupo. Celado de la kartelo estas reciproka helpo, estas tute indiferente kiamaniere, ĉefe en propaganda kaj mondemando.

K-do *Petersen:* Komunan vesperon kun burĝuloj ni neniam faris, danĝeroj en la rilato al klaskonscio ktp. ne ekzistas.

K-do *Burger*-Essen diras, ke ili en Essen per la kunlaboro de la neŭtralaj kaj katolikaj grupoj sukcesis enkonduki Esp. en la senkonfesiajn lernejojn. Essen-anoj en la monkaj propaganddemando ne kunlaboras kun la burĝuloj.

K-do *Petersen* rekomendas, ke la SAT-grupoj en urboj, en kiuj ili havas la *plimulton*, kunlaboru kun la burĝuloj, sed nur se ili scias ke ili havos profiton el tio.

Punkto 4-a. K-do *Gläser*-Solingen parolas pri la novaj silaboj [1]) kaj proponas, ke la kongreso diskutu pri ĉi afero.

K-do *Klopfleisch* parolas pri la evoluo de Esp. al Ido. Oni ofte mokante devas aŭdi de la idistoj: "Nu, vi ja prenas la silabojn el Ido".

K-do *Remers:* Ni ne elĉerpas el Ido, sed el la Internacia lingvaro. Ido ja ĉefe konsistas el Esp.

Punkto 5-a. Sub ĉi-punkto k-do *Klopfleisch* kaj k-do *Bossinger*-Solingen parolas pri Olimpiado en Frankfurto. Ili deziregas, ke multaj SAT-anoj venu al Frankfurto, ĉar ni per tio ricevos grandan influon inter la sportularo.

Fine k-do *Wieditz*-Elberfeld interese disertacias pri la temo: Esp. kaj Radio. La ekstrakto de lia parolado estas, ke por la klaskonscia proletaro *Radio nun* (escepte Rusio) *ne havas realan valoron.* Je la 4a horo k-do *Remers* fermis la konferencon.

Por la konferenco: La sekret.-protokolanto
Fritz Palm.



LEICHLINGEN (Rejnlando): Hejmo de la proletaria Turista Unuiĝo "La Naturamikoj".

---

1) Afiksoj, finaĵoj? — Red.

KRONIKO

Jugoslavio

Split. Ĵus finiĝis dua ĉi-jara lab. kurso, kiun bonsukcese finis 27 gek-doj. Dum lernado la gelernantoj estis sennaciece edukitaj de imitinda kursgvidanto k-do M. A. kiu daŭrigas perfektigan kurson. SAT-grupo estas ne fondebla pro grandskale reganta teroro de nia kanajlaro.

Pro granda mizero kaj senlaboreco ne povos ĉeesti granda nombro da partoprenantoj ĉe nia V. en Vieno, sed oni decidis sendi delegiton.

Neniu lab. institucio, eĉ tiu la plej kultura k. humana ekzistas legale. Al disvastigado de esp-o inter laboristaro oni submetas ĉiuspecajn barojn. La "Sennaciulo" ne venadas regule, ĉar kelkfoje kuŝas ĉe la poŝto 14 tagojn, oni disŝiras vindpaperon, *cenzuras* kaj laŭvole forportas n-ojn.

Laŭ tio, kaj laŭ miloj da ekzemploj, "leĝo garantiinta sekreton de la poŝto kaj leteroj" ne ekzistas, aŭ valoras samtiel kiel ĉiuj burĝaj leĝoj kaj institucioj.

Adriatikuloj.

Sovet-Unio

Blagoveŝĉensk sur Amur (Siberio). La loka esp-ista rondeto de 5.—7. aprilo aranĝis esp-aĵan ekspozicion, kiun vizitis 249 personoj. Plejmulto de vizitantoj interesiĝis pri korespondaĵoj el 34 landoj de ĉiuj kvin partoj de la terglòbo, pri revoluciaj eldonoj de SAT kaj SEU, pri "S-ulo" kaj aliaj similaj eldonoj, kies kvanto superis 500. Je la unua tago de la ekspozicio aperis 1-a n-o de murgazeto "Ruĝa Esperantisto", pri kiu loka gazeto "Amura Vero" donis bonegan recenzon. 14. aprilo, okaze de 8-jara datreveno de morto de Zamenhof, oni aranĝis funebran kunsidon. La rondeto aliĝis al SEU. 15. aprilo en Intersindikata Klubo malfermiĝis kursoj kun 47 p. Instr. k-do Borisoglebski. 1. majo aperis 2-a n-o de "Ruĝa Esp-isto". 2. majo oni malfermis esp. rondeton en Intersind. Klubo, kie oni povas vidi ĉiujn novajn lab. ĵurnalojn, ruslingvajn propag. librojn, diagramojn kaj eĉ standardojn de SEU kaj SAT. K-do Borisoglebski tradukas el S-ulo por la div. gazetoj de l' distrikto.

Kremenĉug. Esp. enpenetras mason malrapide sed forte. Ni ricevas div. leterojn el vilaĝoj kaj vilaĝegoj de vilaĝanoj, instruistoj, kun peto alsendi esp. lernolibrojn, plakatojn, flugfoliojn ktp. Ni intencas nun eldoni ukrainlingvan broŝuron pri SAT kaj esp-ismo. Cio jam estas preta, kaj baldaŭ ĝi aperos. El Glavprofobr de Ukrainio (Centra Fako de Prof. Klerigado) Kremenĉugaj lernejoj ricevis cirkuleron en kiu estas skribite, ke Glavprofobr rekomendas lerni esp-on, ĉar ĝi estas pli taŭga por proletaro ol aliaj lingvoj. Eĉ sur bordo de Dnjepro Kremenĉuganoj vidas du boatojn kun surskriboj "Esperanto" kaj "Sago" esp-lingve, kaj tio impresas.

1122.

RECENZEJO

Gazetoj

Represis el S-ulo: *Ruhr-Echo*, Essen, 19. 5., Sind. movado (S. 32), *Arodneeku domas*, Riga, 16. 5., Vivkostoj en Anglio (S. 25), Nova milito prepariĝas (S. 29), *Amurskaja Pravda*, 26. 3., La civilizacio kaj sklaveco (S. 21), Teroro en Bulg. (S. 23), *Martakoĉ*, Tiflis, majo, Litovio (S. 30), Turnventego en Usono (S. 30).

Libroj

International Radio Manual, de *H. A. Epton.* Eld. The British Esperanto Assocn., Inc., 17, Hart Street, *London W. C. 1.* 80 paĝoj. Formato 10½×16, kartonita. Prezo necitita.

Rapidkurso por anglalingvanoj, speciale por radio-aŭskultantoj. Konciza gramatiko. Ekzercoj kun "radio"-teknika enhavo. Angla-esperanta kaj Esperanta-angla radio-vortlistoj. Radio-simboloj. Ĉefaj radiostacioj de la mondo. Uzataj mallongigoj en radio-interrilatoj. Esperanto-movado kaj radio ktp.

GRAVA ENKETO: SAT-ANOJ HELPU

Laŭ raporto de la Ligo de Nacioj, la ĉefnacioj dum la lastaj tri jaroj eksportis militilojn, krom militŝipoj kaj aeroplanoj, je valoro de 45000000 $. El tiu kvanto Usono eksportis por 15000000 £ kaj Britio por 14000000 $. La ĵus finita Konferenco en Ĝenevo ne sukcesis eĉ kolekti precizan informon. Kompreneble SAT-anoj ne kredas, ke la militilkomercistoj kaŭzas militon, kiun nature kreskigas kapitalismo en ĝia imperialista periodo. Sed simile kiel la alkoholfaristo profitas el la brutigo de homoj, la militilproduktistoj akrigas la naciismon kaj ĵaluzon de la malsaĝa amaso ĉiulanda.

Antaŭ la milito Liebknecht kaj aliaj malkovris la veran internaciismon de la militiltrustoj. Kiam ekzemple oni povas montri, ke torpedoj fabrikitaj per brita kapitalo mortigis multajn maristojn britajn dum la milito, oni ekpensigas aŭskultantaron. Kaj mi opinias — kvankam la afero ne pliboniĝus se la ŝtatoj mem fabrikus la militilojn — ke per tiaj faktoj ni povas malfermi okulojn al multaj. Tial mi petas, pruvu la utilecon de Esp. en tiu ĉi grava afero:

1. Sendu informon pri la komerco en militiloj. Ĉu via lando eksportas aŭ ne? Ĉu la firmoj interrilatas kun alilandaj produktistoj? Dokumentoj, libroj, eltranĉaĵoj el ĵurnaloj tre valoras.

2. Observu la rilatojn inter la mortigilaj firmoj kaj la ĵurnalaro kaj raportu detalojn de kunago en la disvastigo de famoj ktp.

Sekretoj de la Belgrad-a Kamariljo

2] (Daŭrigo)

La atencontoj estis tri volontuloj el tiama Aŭstrio, al kiuj la generalo Petar Živkoviĉ propramane elpagis 20000 ordraĥmojn, kiel atencrekompencon kontraŭ D. Apis. Post la atenco ili estus ekveturantaj Albanion, pere de internministra aŭto gvidata de policisto Duŝan Nikoliĉ, el kie ili estus sendintaj leteron al la serba armeo, pri la mortigo de D. Apis.

La unua provo maltrafis, ĉar unu el la volontuloj sciigis D. Apis'on, ke li ne iru tiuvoje ol loko kie li devis deĵori kiel stabĉefo de la tria armeo.

Pri tio ĉi ekzistas skriba dokumento de la volontulo kun precizaj projektoj.

Alia provo: Politika proceso. Ĝi estis plenumita jene: La Ministra Konsilantaro, en kiu, krom radikaluloj estis ankaŭ la demokratoj Davidoviĉ, Draŝkoviĉ kaj Marinkoviĉ, kiuj kiam estis vorto pri indulgo de D. Apis elvokis bruon kaj abdikis je regado, decidis la 6. 10. 1916, laŭ referencoj de interna ministro Ljuba Jovanoviĉ kaj milita ministro Terziĉ, ke la "N. M"-anoj estu arestataj pro la "intencvola" transdono de la Salonika Fronto al la aŭstri-germana militistaro.

Dum 10.—20. de l'sama jaro kaj monato eĉ la simpatiantoj de la „N. M." estis arestitaj.

Serba registaro, tuj post aresto, eldonis oficialan komunikon, kiun la tuta eŭropa ĵurnalaro siatempe presigis. Ĝi tekstis jene: La oficiroj apartenantaj al la „Nigra Mano" estas arestitaj, ĉar ili volis transdoni la salonikan fronton al la aŭstri-germana militistaro.

Kompreneble ĉi-akuzo estis mensoga, ja, pri ĝi dum juĝa diskutado neniu vorto estis dirita. La komunikon ili bezonis por ke ili ricevu la sendependan agpermeson, tial ke la antanto havis ĉefdirektadon.

Post kiam tiama reganto Aleksandro, Blanka Mano kaj radikala registaro ricevis sendependan agpermeson, ili elpensis pri iu nek vidita nek ĝis tiam aŭdita atenco kontraŭ la reganto okazinta la 29. VIII. 1916.

Helpe de ŝtatperfida akuzo kaj elpensita atenco ili sukcesis mortigi Apis-on.

Tri kialoj ilin instigis mortigi la N. M.-estron. Unue: sincera, spiritforta, kaj kuraĝa monarkia kontraŭulo li estis; due: li organizis la sarajevan atencon; trie: pro la timo, ke li ŝarĝu ilin pri tio, ke ankaŭ ili sciis pri la atenco.

Kio rilatas la unuan kialon, mi diris, ke Apis sin deklaris respublikano jam komence de la batalo je „antaŭeco". Dua kialo por Pasiĉ estas jena:

"La centraj ŝtatoj fine de 1919 sur ĉiuj frontoj faris ofensivon, kiu esperigis ilian venkon."

Tial Pasiĉ tiam havis la interligon kun Aŭstrio (malkovro de Sixtus de Bourbon) kaj mortigis Apis-on, kies liveron Aŭstrio estus postulanta en okazo de venko. Laŭ tio la trian kialon ili defendis.

Li — ĉefa faktoro — estus povonta esti ĉefatestanto kontraŭ la reĝo kaj Pasiĉ.

Stojan Protiĉ tion jam publike asertis kaj polemikante kun la angla publicisto Scotus Viator eĉ li konfirmis. Kiam la publicisto al li "subnazigis", ke ili neleĝe procedigis la proceson kaj sen iu kulpo mortigis Apis-on, li respondis: Ekzistas skriba dokumento kiu malpostulas lian indulgon. Post milito li tion represis en "Radikal".

La skriba dokumento estas konfirmo, flanke de Apis, ke li organizis la sarajevan atencon, kaj en ĝi enestas la nomoj de ti-kiuj sciis pri la atenco.

En la preparlaboroj, de la ambaŭ eksponitaj kazoj rekte partoprenis reĝo Aleksandro, Pasiĉ kaj Ljuba Jovanoviĉ.

Rilate la reĝon atestas lia letero sendita al generalo Petar Zivkoviĉ, en kiu estas legeble, ke, senkondiĉe, Apis devas esti mortkondamnita.

(Finota)

Utiligon kaj resendon (se necesas) garantias *M. Starr* (488), 25 New St., *London SW. I.*

Internacia konferenco de la Eksmilitintoj en Köln 27.—28. junio 1925

La Internacio de Eksmilitintoj kaj Militviktimoj petas nin pri enpresigo de jena raporto:

La Internacio de Eksmilitintoj kaj Militviktimoj kunvokas konferencon internacian al Köln, por diskuti pri la pensioj kaj ĉiuj interesoj de la militviktimoj. La mizera situacio de la militdifektitoj, de la postrestintoj, de la invalidoj de laboro ekzistas en ĉiuj landoj. Tial ĉiuj militviktimaj organizaĵoj estas invitataj kaj ĉiuj asocioj de sociaj kaj invalidaj pensiuloj, por unuiĝi por komunaj postuloj, por unuece konduki la lukton pro sufiĉa prizorgo kaj subteno. Konsiderante la grandegan diferencon de la leĝa zorgado en la unuopaj landoj kaj la tutan mankon de zorgado en kelkaj landoj, kiel Bulgario kaj Hungario, tiu ĉi konferenco estas urĝa bezono. Estas la speciala merito de l' I. de Eksmil., esti farinta la iniciativon, por kunigi la diversajn militviktimajn ligojn al komuna konferenco.

La tagordo fiksita definitive en komuna konsilo estas jena:

1) Malfermo kaj elekto de komisionoj por propon-ekzameno ktp.

1) La stato de l' zorgado pri la militviktimoj en la landoj partoprenintaj la militon (Referas: La Intern. Labor-Oficejo).

3) Internacia lukto kontraŭ la dekonstruo de l' socia politiko kaj la devig-tendencoj en la socia zorgado (Referas: Karl Tiedt-Germanio).

4) Internaciaj problemoj kaj postuloj por la militviktimoj rilate al zorgado, kuracado, deviglaboro ktp. (Referas: Kainradl-Aŭstrio, Gilbert-Francio).

5) Praktika kaj solidara kunlaboro de la militviktimaj organizaĵoj rilate al organizo, material-interŝanĝo, kaj en kelkaj zorgad-kazoj (Referas: aŭstriano).

6) Socia asekuro kaj militviktima zorgado (Ref.: Wiest-Germanio).

7) Diversaĵoj.

Kiel videble el la tagordo, la Intern. Labor-Oficejo akceptas referaton al 2-a punkto.

Invititaj ankaŭ estas je decido de l' ekzekutivo la Internacia Sindikata Asocio kaj la Ruĝa Sindikata Internacio, por pli intime ligiĝi kun la racia laboristaro kaj iliaj ekonomiaj organizaĵoj, por komune kun ili fari la batalon kontraŭ malsato kaj mizeriĝo.

Liberpensula kongreso

Sub la aŭspicioj de la "Fédération Internationale des Sociétés de Libre Pensée" okazos Kongreso en Parizo de la 15. ĝis 18. aŭgusto 1925, kaj la Internacia Ligo de Liberpensuloj deziras, ke Liberpensuloj Esperantistoj ĉeestu grandnombre, ĉar tiu Ligo enkondukos la demandon pri Esperanto.

Estas la devo de ĉiu esperantisto, kiu estas membro de iu nacia liberpensula asocio, peti lian asocion sendi lin kiel delegiton, ankaŭ ĉiu, kiu intencas iri al tiu Kongreso, sed ne reprezentos iun asocion, bonvole skribu al k-do *E. E. Yelland*, 3, Fonhtill Road, *London, N. 4.*

Pri pluaj detaloj de la Kongreso ni sciigos en junio en diversaj esperantistaj gazetoj.

Redakcioj de esperantlingvaj gazetoj kaj ĉiulandaj gekamaradoj estas petataj! Nia filio de l' Laborista Esper. Societo "Laboro" decidis propagandcele aranĝi en tre proksima tempo ekspozicion kaj petas Vin sendi ĉiulandajn postmilitajn esper. gazetojn, ĵurnalojn, flugfoliojn, P. I. ktp. *Escepte:* "Heroldo de Esperanto", "Esperanto" ĝeneva, "Sennaciulo", "Sennacieca Revuo", "N. Tempoj", "Esperantista Junularo" kaj "Literatura Mondo". Ni sincere antaŭdankas por ĉio. Adreso: *H. Halpern, Lublin,* Rynek 7, Polio.

Pri spionoj kaj provokistoj

En n-o 32 k-do Jeniec raportis pri la abomenindaĵo, kiu okazis en Polio. Temas pri fimortigo de k-doj Baginski kaj Wieczorkiewicz. Ni ankoraŭ ne havis sufiĉe da tempo por trankviliĝi, kiam gazetoj sciigis nin pri la dua okazintaĵo.

La 1. majo vespere eksplodis bombo en la redakcio de "Walka ludu", organo de Sendependa Vilaĝana Partio en Varsovio, kiu danĝere vundis manipulantan ĉe bombo respondecan redaktoron Czeslaw Trojanowski. Dum la esplorado de persono de tiu-ĉi Trojanowski, la juĝistaro konstatis, ke li kiel spiono de defensivo akceptis postenon de respondeca redaktoro en la suprenomita redakcio, kaj poste laŭ permeso de defensivo li preparadis bombojn por nekonataj (verŝajne por provokaj) celoj. Reprezentantoj de PPS. (Pola Partio Socialista) tuŝis ĉi-aferon en sejma interpelacio, kaj tuj sekvantan tagon la anstataŭanto de defensivestro en Varsovio komis. Lenski estis eksigita, alia komis. Piontkiewicz . . . petis eksigon. En Polio tiajn provokistojn ni trovos multe en diversaj laboristaj organizaĵoj. Neniel mirinde. Iliaj perlaboroj estas grandaj. *H. Hn. (Lublin).*

Publika kvitanco de sumoj donitaj al suferanta kamarado (vidu S. n-o 22)

Z-London, 10 ffr., Z-Paris, 10 ffr., Rondelet-Marchin, 9,55 ffr., Berger-Wien, 50000 kr., NN 1.—, Mersiovski-Leipzig, 1.— mk.

La kamarado dankas kore al ĉiuj donacintoj!

Se vi deziras respondon de administracio aŭ redakcio, ne forgesu aldoni reafrankon!

Unuigita eldonejo "La Nova Epoko" kaj CK SEU

Ĵus aperis! Ĵus aperis!

E. IZGUR

Organizo de internacia solidareco

La lingvo internacia je la servo de l' proletaro

Popularforma 36-paĝa ruslingva broŝuro pri mondlingva problemo kaj pri SAT. Pr.: 20 kop.

Mendu ĉe librejo de C. K. Svjazj, **Moskvo,** Solanka 12, k. 326. Senpere al la eldonejo adresu nur opajn mendojn (ne malpli ol 50 ekz.)

Se vi deziras perfektiĝi en la scio de Esperanto, legu la librojn eldonitajn de SAT!

	mk. g.	sv. fr.
Ni Legu! Internacia legolibro	0.90	2.20
Nur Volu! (Izgur)	0.25	0.40
Faŭsto, Goethe	1.—	2.20
Eklumo en la abismo, Barbusse	0.75	1.50
" " " " bindita	1.35	2.70
La Komunista Manifesto (2a eld.)	0.40	0.60
Dokumentoj de Komunismo	1.—	2.20
A.B.C. de Sennaciismo (la fundamenta libro por ĉiu SAT-ano)	0.45	0.90
For la Neŭtralismon! (2a eld.) (informas pri celoj kaj taskoj de SAT)	0.20	0.35
Malgranda Terbiblio (Prol. Atlaso) (nia grandformata kartaro sur luksa papero)	1.80	3.60
Proletaria Kantaro, 74 kantoj kun muziknotoj	3.—	6.—
Du verkoj de nia scienca serio:		
El la mondbildo de l' nova fiziko	0.40	0.80
La Kemio de l' Universo, Fersman	0.50	1.—
Kontraŭ Dio! Ateista krestomatieto. (Multaj valoraj artikoloj de libera penso)	0.35	

En preparo:

Petro — La libro por **ĉiuj!** (Atentu venontajn anoncojn).

Anoncu vin kiel abonanto al "Biblioteko de Sennaciulo"!

Notlibro kun kalendaro 1925 (luksa eldonaĵo de UNS-presejo) Restis nur ankoraŭ kelkaj ekzempleroj (sen rabato) . . 0.60

Inkluz. sendkostoj, 20% rabato por SAT-anoj!

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas – Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.
Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr; ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej. **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ 1/4 jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG